

# EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro



Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**EKO 2023 / 67. Novembro 27, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler. Tria kontrolanto dezirata.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 360 KB. Alkroĉaĵoj: neniu de SMG. Sume: KB 400.**

## Finiĝis la 4-a Virtuala Kongreso

La 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) estas realigo de [Universala Esperanto-Asocio](#), en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko. Ĉefgvidas la organizan teamon la vicprezidanto de UEA, Fernando Maia Jr., ankaŭ estrarano pri Kulturo kaj Kongresoj. Kunrealigas kaj teknike prizorgas la teamo de la neprofitocela esperantista organizo [E@I](#). Kunrealigas kaj kunprizorgas la muzikan programon Floréal Martorell kaj la teamo de [Eurokka/Vinilkosmo](#). La virtuala kongreso ricevis finanĉan apogon de la Eŭropa Unio.



Aperis la dua kaj tria numero de "Migranta Hirundo", la virtuala kongresa kuriero de la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto. Elŝutu senpage:

[https://revuoesperanto.org/images/Migranta\\_hirundo\\_2.pdf](https://revuoesperanto.org/images/Migranta_hirundo_2.pdf)

[https://revuoesperanto.org/images/Migranta\\_hirundo\\_3.pdf](https://revuoesperanto.org/images/Migranta_hirundo_3.pdf)

[https://revuoesperanto.org/images/Migranta\\_hirundo\\_4.pdf](https://revuoesperanto.org/images/Migranta_hirundo_4.pdf)

[https://revuoesperanto.org/images/Migranta\\_hirundo\\_5.pdf](https://revuoesperanto.org/images/Migranta_hirundo_5.pdf)

La temo de VK estas la sama kiel tiu de la UK en Torino: 'Enmigrado kaj Kunfluo de Homaj Valoroj'. Sekvas ero el la VK pri tiu temo:

### **Thomas Bormann pri migrado**

"Mi analizos la situacion ĉirkaŭ la Mediteranea maro. Miloj da rifuĝantoj klopodas atingi la bordojn de Eŭropaj landoj; multaj personoj mortas dum la transporto. La nombroj de 2022 estas 159 410, samtempe estis registritaj 2439 mortintoj en la Mediteranea maro. La EU-ŝtatoj celas malebligi ne-laŭleĝan enmigradon, ĝis nun sen sukceso. Eŭropa Unio traktas kun nord-afrikaj landoj por interkonsenti regulojn rilate al migrado: EU ofertas laŭleĝan enmigradon por malgranda nombro da personoj (ekzemple por labori aŭ por studi en EU-landoj). Kompense la koncerna nord-afrika ŝtato reprenu la migrantojn kiuj venis al EU laŭ ne-laŭleĝa vojo.

En la jaro 2016 Eŭropa Unio ja atingis interkonsenton pri migrado kun Turkio: Estis interkonsentite, ke Turkio kontrolos siajn limojn por malebligi la migradon de rifuĝantoj al Eŭropa Unio, kompanse EU pagas monon por kovri parton de la kostoj por subteni siriajn rifuĝantojn en Turkio. Vivas pli ol tri milionoj da siriaj rifuĝantoj en Turkio. Eŭropa Unio ĝis nun elspezis ĉirkaŭ dek miliardojn da eŭroj por tiu celo – ĉu bone investita mono?”

Thomas Bormann

## Organiza sukceso de la Hispana Kongreso

La Hispana Esperanto-Kongreso okazis oktobre en Sevilo kun granda sukceso, kunvenigante ĉirkaŭ 150 esperantistojn el diversaj mondpartoj. Bedaŭrinde kelkaj vizitantoj ne ricevis la necesajn vizojn. Ni devas ankaŭ reliefigi la altan kvaliton de la universitata [antaŭkongreso](#), kiu okazis en la Universitato de Sevilo. Resumo de la disvolviĝo de la kongreso legeblas ĉe [ĉi tiu Wikipedia ligilo](#). Por komencantoj de Esperanto oni povas legi resumon en la retejo de *UEA.facila*, kiun Universala Esperanto-Asocio redaktas per pli simplaj tekstoj. Ĝi troveblas ĉe [ĉi tiu ligilo](#). La antaŭkongresaj prezentoj ĝueblas ĉe la kanalo Civiciencia ĉe [ĉi tiu ligilo](#). Parto de la kongresaktivajoj estis filmita, kaj spektoblos baldaŭ ĉe la [jutuba kanalo](#) de Hispana Esperanto-Federacio. Kiel antaŭĝuon oni nun povas aŭskulti la version de la Esperanta himno "[La Espero](#)", kiun prezentis la soprano Rocío de Frutos dum la malfermo de la kongreso. La kongreso de 2024 okazos en la Valencia Komunumo, eble en septembro en la urbo Cheste.

Koncizigita el la 91-a Bittulteno de HEF.

## INK-luda interveno – kontribua bonveno

La Interkultura Novelo-Konkurso (INK) havas novan temon: **Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj *Homo sapiens***. La kvara eldono de la konkurso estis lanĉita en Retos kaj estas rezulto de kunlaboro kun la Akademio Literatura de Esperanto (ALE), Bobelarto kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La konkurso celas stimuli novel-kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj per la eblo konkursi en ses lingvoj: krom Esperanto, uzeblas la itala, kataluna, persa, rusa kaj ukraina. Tradukaĵoj el aliaj lingvoj daŭre bonvenas.

Eblas gajni en la du kategorioj de komencantaj kaj spertaj verkistoj entute dek monpremiojn kun la suma valoro € 4500. La prezidanto de la konkurso estas la irana esperantisto Ahmad Mamduhi, la prezidanto de ILEI.

Noveloj devas esti neniam antaŭe publikigitaj. La teksto-proponoj devas havi **maksimume 2000 vortojn** (proksimume 6 paĝojn). Ne estas minimuma longo. La konkurso permesas uzadon de artefarita intelekto (AI) por kontribui al la verkado, ties uzon oni devas mencii en la sendoformularo. Konkursi eblas per **du noveloj**.

La ĵurio konsistas el reprezentantoj de diversaj kulturoj. La gajnintoj estos anoncitaj dum la 110-a Universala Kongreso de UEA en 2025. En la porkomencanta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de € 500, 400, 300, 200 kaj 100 respektive. En la sperta kategorio, la aŭtoroj ricevos premiojn de € 1000, 800, 600, 400 kaj 200 respektive. **La limdato estas la 30-a de junio 2024.**

Vidu ĉiujn informojn kaj detalojn pri la konkurso ĉe: [bobelarto.ink/konkurso](http://bobelarto.ink/konkurso).

Kadre de la tria eldono, kies temo estis *La sekreta vivo de miaj najbaroj*, la Interkultura Novelo-Konkurso ricevis 1331 konkursantajn novelojn de partoprenantoj el 48 landoj. La gajnintoj estos anoncitaj kaj la novel-rikolto lanĉita dum la venonta 109-a UK, okazonta en Aruŝo, Tanzanio. Por aliĝi vizitu: [uea.org/kongresoj/alighilo](http://uea.org/kongresoj/alighilo).

La du novel-rikoltoj de la antaŭaj konkursaj eldonoj estas aĉeteblaj en la [Libroservo de UEA](#) (*Amo, tuso kaj forpaso* [katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=669](http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=669) kaj *La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj* [katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=233](http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=233)), ankaŭ ĉe [eldonejo KAVA-PECH](#) (*Amo, tuso kaj forpaso* kaj *La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj*).

Koncizigita el Gazetara Komuniko de UEA

## Aruŝa atingebla trajne!

Jes eblas, kaj estas video, kiu montras la pejzaĝon, kiun ni ne vidas, se vi flugos. Estas la linio, kiun germanoj konstruis.

<https://www.youtube.com/watch?v=8y5ExpNimhM>

Tanzania | Overnight TRC Train from Dar Es Salaam to Arusha

La filmo inkludas kurson de 'svahili' supozeble. Sed eblas meti Esperanto-takston.

Roland Schnell, fakulo pri orientafrika fervojo kaj "Liemba"

**SMG avertas:** Nepre rekontrolu la faktan ekziston de pasaĝera servo en tiu linio. Rete, mi trovis kontraŭdirajn informojn, ke JES kaj NE estas tie pasaĝera servo.



## BrazilMuzika Klubo

En nia **Monata Renkontiĝo** venis kvar muzikistoj, krom la aŭskultantoj kaj muzikemuloj. Ĉiu partoprenis per babilado kaj bonaj energioj. Omaĝo al nia amiko Amarílio Carvalho okazis. La registraĵo de la kunveno estas disponebla en la klubejo por abonantoj de la Blanka Etaĝo.

En la Ĉambro *Premieroj* estas aldonita la komponaĵo *Sen homa mezuro*, kiun **Flávio Fonseca** verkis surbaze de belega poemo de la ĉeĥo **Jiří Kořínek**.

## ILEI kun nova reta vizaĝo en Hispanio

Lastatempe estis relanĉita la Reto de Esperanto-Instruistoj en Hispanio, organizita kiel la hispana sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ([ILEI](#)). Unu el ĝiaj unuaj agadoj estis la konstruado de retejo dediĉita al la organizaĵo, al instruado kaj Esperanto, kiun vi nun povas konsulti ĉe la adreso <https://ilei.esperanto.es>.

Laŭ Bitbulteno 91 de HEF

## La hungara urbo Dombóvár centjariĝis

Okazis la malfermo de la ekspozicio pri la centjariĝo de uzo de Esperanto en la urbo Dombóvár organizita de loka samideano S-ro Róbert G. Nagy (Nadj), kiu estas la motoro ankaŭ de la urba vikipedio. Loka televido en novembro en novaĵprogramo elsendis bonan raporton pri la evento.

Por pliaj informoj, vi povas viziti la Vikipedian paĝon

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Domb%C3%B3v%C3%A1r>



## TEJO-seminario en Budapeŝto

Ĝi tion faris kadre de eŭropa subvencio. Ni ricevis de s-ro Vuk Mladenović el Serbio prezentaĵon pri tiu seminario. Eĉ post sveltigo, ĝi restas je 1,21 MB, tro peza por EKO. Kiu deziras ricevi ĝin, petu tion de SMG. EKO prezentas la lastan bildon el la prezentaĵo. La informo venis al ni pere de la ĉiumonata kunsido de la danuba-balkana laborgrupo.

## Ĉu facila estas la geedziĝo?

Teksto en facila Esperanto de Adje Adjevi pri dotoj kaj geedziĝoj:

<https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/doto-unue-geedzi%C4%9Do-poste-r398/>

## Multlingve pri homaj rajtoj

La Mesaĝo de UEA pri la Tago de Homaj Rajtoj (je la deka de decembro) pretas en la angla, la franca, la hispana, la ĉina, la japana kaj la itala versioj. Vidu ilin ĉe:

[Esperanto por UN](#)

Skribas Maritza Gutierrez: “Ni planas festi la Z-tagon la 16-an en Havano kaj ankaŭ dum tiu semajnfino en Guantanamo, do, ni pretas diskonigi la Deklaron hispanlingve kaj ankaŭ dum niaj porokazaj renkontiĝoj kaj en Havano kaj Guantanamo”.

## Taŭro por la humura restaŭro

Alex Humet, mia ege pasinta kataluna kolego en la Centra Oficejo de UEA, dissendis tre amuzan bildon. Ĝi ilustras kiel la hispanoj sukcesis instigi la civitanojn resti hejme dum la kovida epidemio.

===== vortoj: 1270 =====



## La kolekto de EKO por 2023:

<https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 60).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldona al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.